



# aktuala

## 35-a ELDONJARO

**Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be); [xurb.freehostia.com](http://xurb.freehostia.com); [esperanto.net](http://esperanto.net); [esperanto.be](http://esperanto.be); [lernu.net](http://lernu.net); [uea.org](http://uea.org); [liberafolio.org](http://liberafolio.org); [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net); [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala); [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 3 - Esperantaj Eventoj
- Paĝo 5 - Malferma Tago 31a de Centra Oficejo de UEA
- Paĝo 6 - Jacob Hasbun pri Arabaj Noveloj
- Paĝo 7 - Camoens, Bronŝtejn, Garcia, Moĵaev, Novembro, Souza
- Paĝo 8 - Venu al Loveno, Visaginas kaj Aalen
- Paĝo 9 - Elefanto aperis en mia urbo; Esperantigita Hotelo
- Paĝo 10 - Probal Dasgupta kaj Tahira Masako
- Paĝo 12 - Miŝa Bronŝtejn pri Lidia, Filino de Esperanto
- Paĝo 14 - Bertha von Suttner kaj Alfred Nobel
- Paĝo 17 - Belartaj Konkursoj; Balotado ĉe UEA
- Paĝo 18 - Rusia Jubileo; Jules Verne; E-Flago de Casquero

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Decembro 2009

- 2; 9 Preparado de Zamenhof-festo
- 12 Sabata Zamenhof-festo de EBG en kutima Zeyp-centro
- 16 Seán Oriain pri "E-o Toastmasters", prokrastata al 2010

### Januaro 2010

- 13 Eddy Raats pri vojaĝoj en Kubo
- 20 Bernard-Regis Larue pri Saturno Majstro de la Ringoj
- 27 Franz Meul, LVS Antverpeno pri Kuba Socio: Impreso de Vojaĝo Junia 2008

### Februaro 2010

- 3 Semajna kunveno
- 10 Eddy Raats pri vivo en Kubo
- 17 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 24 Sebastjan Kirf prelegas pri Diplomalaborado kaj Bona Espero

## SEMAJNA KUNVENO DE EBG MERKREDE 25-11-2009



Bernard-Regis Larue prelegas pri Jupitero la Giganta



Kurso de unua nivelo (komencantoj 14) gvidata de Françoise Pellegrin



Kurso de dua nivelo (progresantoj 8) gvidata de Gregory de Ketele

## ESPERANTAJ EVENTOJ




Dimanĉe, la 6an de Decembro, Zamenhof-festo de E-Grupo "La Konkro" en Oostende



Merkrede, la 9an de Decembro, Zamenhof-festo de Esperanto 3000 Leuven



Vendrede, la 11an de Decembro, Zamenhof-festo de E-Grupo "La Hirundo" en Tienen



Du unuaj fotoj de la Z-festo en Tienen, estraro de "La Hirundo" kaj flandra muzikgrupo kun franca nomo "Chic et pas chère". Du lastaj fotoj Z-festo de E-Brusela Grupo en "De Zeyp", jubilea torto de la 150 jaroj de Zamenhof kaj Françoise Pellegrin bele maskita kiel kubano.

3

4



Sabate, la 12an de Decembro, Zamenhof-festo de E-Brusela Grupo en "De Zeyp"



En la bildo supre prof. Duncan Charters prelegas pri Ivo Lapenna dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA, la 28-an de novembro. Malsupre la programo.

**PROGRAMO**

Centro	Horo	Programo
Konferencoj	10:00 - 11:00	Isabel Ortíz, Novaĵoj en la Literaturo
	11:00 - 11:45	Carla Minerva: Miaj renkontiĝoj kun Ivo Lapenna (1)
	12:00 - 12:45	Duncan Charters: Miaj kontaktoj kun Ivo Lapenna
	13:00 - 14:00	Kapriol' kantas, kantiĝas kaj dantiĝas
	14:15 - 15:00	Yvonne Rodriguez kaj Herberio Díaz salutas el Kubo
Biblioteko (Bibliot)	15:00 - 16:00	Carla Minerva: Miaj renkontiĝoj kun Ivo Lapenna (2)
	16:15 - 17:00	Elstaro de I&E en prezenta Esperanto en laborotendaro en 1909 (dentalantologio, 34)
Egipcio	11:30	Esperanto-foro D a. 51-a UK
	12:30	Bildstudo: 1946: 157
	13:30	46-a UK, Sufio 1963 (28)
	14:30	72-a UK, Varsovo 1967 (28)
	15:30	Esperanto en laborotendaro en 1965 (dentalantologio, 34)
Literaturo	16:30	55-a UK, Vieno 1970 (32)
	10:00 - 17:00	Bazaro de esperantaj
	10:00 - 17:00	Ribakta vendado
Egipcio Burg	10:00 - 17:00	Sempajaj kafe kaj teo

### 31A MALFERMA TAGO DE C.O. DE UEA KUN 120 VIZITANTOJ

La vivo kaj verko de Ivo Lapenna estis temo de la 31-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de novembro. Tiu ĉi populara aranĝo okazis tri semajnojn post la 100-a naskiĝdatreveno de Lapenna (1909-1987) kaj allogis 120 vizitantojn el 16 landoj. S-ino Birthe Lapenna ĉeestis la Tagon kaj ricevis kiel memoraĵon enkadrigitan folion kun 10 poŝtmarkaj portretoj de sia edzo, "por rekompenci kun rento la portreton, kiun ŝi donacis al la Centra Oficejo en la Malferma Tago en aprilo 1998 okaze de la 90-jariĝo de UEA", klarigis la ĝenerala direktoro Osmo Buller.

La ĉefpreleganto estis prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. Li parolis en du partoj pri siaj renkontiĝoj kun Lapenna, kiun li, denaska esperantisto, ekkonis kiel juna knabeto, ĉar Lapenna ofte gastis en la familio de la famaj italaj esperantistoj Luigi kaj Carolina Minnaja. Sian prelegon Minnaja ilustris per fotoj kaj filmfragmentoj. Li montris ankaŭ la Pokalon Ivo Lapenna, konservatan en la CO, sur kiu lia nomo estas gravurita kiel la unua post lia venko en la Oratora Konkurso en 1960. Pri siaj kontaktoj kun Lapenna parolis ankaŭ prof. Duncan Charters, vicprezidanto de ILEI, kiu aparte elstarigis lian atenton al la lerneja agado, i.a. kiel iniciatinto de serio de Internaciaj Lernejoj Konferencoj.

La publikon plene kaptis la frisa grupo Kapriol', kiu krom mem kanti, kantigis kaj eĉ dancigis la publikon. Ĉeestis ankaŭ neesperantistaj popoldancistoj, kiuj en plezura maniero povis konatiĝi kun la Esperanta kulturo. Norberto Díaz kaj Yoandra Rodríguez portis salutojn el Kubo. Ili rakontis kaj respondis demandojn pri la preparado de la 95-a UK en Havano. Katalin Kováts kaj Zsófia Kóródy disdonis atestilojn al trapasintoj de lingvoekzamenistaj kursoj kaj diplomojn al sukcesintoj en ekzamenoj laŭ la Eŭropa Referenckadro. Pri la lasta horo en la prelegejo respondecis ILEI, kies nova estraro kunsidis en Roterdamo ĉirkaŭ la Malferma Tago kaj ricevis okazon prezenti sin kaj siajn planojn. La revigliĝo de la instruista asocio tre impresis la publikon. Rimarkinda estis la interesiĝo pri la instruista trejnado, kiun oni klare sentas kiel urĝan taskon.

Biblioteko Hodler funkciis kiel kinejo de dokumentaj filmoj. En la filmoj pri la UK-oj en Budapeŝto en 1966 kaj Vieno en 1970 eblis vidi i.a. scenojn pri la oratoranta Ivo Lapenna. Scenojn el la Malferma Tago mem montris baldaŭ la Eduka Televido ETV, kies teamo filmis dum la Tago kaj intervjuis la CO-oficiston Ralph Schmeits por programo elsendota en la Roterdama regiono en januaro.

Bonan tagon spertis la Libroservo, kies vendoj sumiĝis je 2416,40 EUR. Pleje furoris la poŝtmarkoj por la 100-a datreveno de Ivo Lapenna kaj la 150-a de L.L. Zamenhof, tiu lasta lanĉita en la Malferma Tago. De ambaŭ estis venditaj po 38 folioj kun 10 markoj. Inter libroj la unuan lokon okupis la lernilo "Esperanto Mini-Course" kun 5 venditaj ekzempleroj. Po 4-ekzemplere vendiĝis la Zamenhof-biografio "Homarano" de A. Korĵenkov, "Mil unuaj vortoj en Esperanto", "Beletra Almanako" n-ro 6, kaj la poŝkalendaro "La Jaro 2010".

La sekva Malferma Tago estos en sabato, la 17-a de aprilo 2010. La ĉefpreleganto estos d-ro Mark Fettes.

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 349, 2009-11-30

### ARABAJ NOVELOJ (7a-13a jarcentoj) NOVELETO 2

Saĝa maljunulo rakontis jenon al mi. Oni ŝtelis kvin cent dinarojn al iu. Li alkondukis la akuzitojn antaŭ la guberniestro, kiu deklaris: "Mi vergigos neniun el vi. Kompense, vi eniru tien! Mi havas fadenon streĉitan en malhela ĉambro. Ĉiu el vi glitigu la manon sur ĝi de unu ekstremaĵo al la alia, enmaniku la saman manon, kaj eliru. Fakte, la fadeno vindiĝos ĉirkaŭ la mano de kiu ŝtelis". Antaŭe li estis nigriginta la fadenon per fulgo. Ili eniris. Ĉiu glitigis la manon sur la fadeno ĉe malheleco, escepte unu el ili. Kiam ili eliris, li rigardis manojn, ĉiujn nigrigitajn, krom unu. Li ordonis ke akuzito redonu la monon. La akuzito devontigis sin pri tio.

### NOVELETO 3

Ibnu Tulun iam vidis portiston kiu agitiĝis sub pezo de kesto. Li diris: "Se tiu agitiĝo estus kaŭzata de la portata pezo, lia kolo enprofundiĝis en liajn ŝultrojn. Kaj kio povas esti tio, krom timo pri tio, kion li portas?" Li ordonis, ke la kesto estu vidigata. Li ene malkovris junan virinon murditan kaj dispecigitan. Li admonis: "Diru al mi la veron pri ŝi!" Portisto respondis: "Kvar homoj, konatuloj, donis al mi tiujn dinarojn, kaj ordonis, ke mi portu tiun ĉi mortigitulinon". Li punis la portiston per du cent bastonbatoj kaj ordonis, ke oni mortigu la kvar homojn.

### NOVELETO 4

Al-Muhassin diris: Alvenis al mi diro pri tio, ke ĥalifo Al-Mu'tadid bil-Lah ellitiĝis nokte por natura bezono. Li ekvidis junan senbarban serviston ekleviĝi disde aliula dorso, rampi kvarpiede kaj enŝoviĝi meze de la servistaro. La ĥalifo

alvenis kaj surmetis sian manon sur la koro de unu post la alia ĝis tio, ke li surmetis ĝin sur la koro de la aginto. Jen ĝi pulsadis impetege. Li levigis lin per kruda piedbatado. Poste, la ĥalifo alportigis la torturilojn, la aginto konfesis kaj estis ekzekutita.

### NOVELETO 5

Iu turkmeno, kiu estis ligiĝita kun alia turkmeno, venis ĉe la sultano Ĝalal ad-Daŭlat kaj diris al li: "Mi malkovris, ke ĉi tiu estas amanto de mia filino, kaj mi volas, ke vi permesu al mi lin mortigi." Ĝalal ad-Daŭlat diris al li: "Ne mortigu lin, prefere ni edzigu ŝin al li, kaj ni pagu anstataŭ li la "mahron" aŭ tradicia pago, el nia trezorejo." Li diris: "Min nur kontentigos lia mortigo." Ĝalal ad-Daŭlat diris: "Donu al mi spadon!" Oni alportis ĝin; li ĝin prenis kaj elingigis, kaj diris al la homo: "Proksimiĝu!" La ĉeestantoj ege miris, kredante, ke li estas mortigonta la patron. Kiam la homo proksimiĝis, li donis al li la spadon, retenante por si la ingon, kaj ordonis, ke li remetu la spadon tien. Sed ĉiufoje, kiam li intencis tion fari, la sultano returnis la ingon, malebligante al la homo tien enŝovi la spadon. Tiam, li diris: "Kio okazas al vi? Kial vi ne reingas la spadon?" Li repondis: "Ho, sultano, vi malebligas min!" Li diris: "Tutsame kiel via filino. Se ŝi ne voluntus kaj malebligus tion, kion faris al ŝi tiu homo, li ne kapablintus ŝin superforti kaj premedvigi. Se vi volas mortigi lin pro tio kion li faris al ŝi, mortigu do ambaŭ." La homo restis senresponde, kaj finfine diris: "Apartenas al la sultano ordoni". La sultano venigis iun, kiu geedzigis ilin, kaj donis la "mahron", elprenita el lia trezorejo.

Jacob Hasbun, membro de EBG, tradukis

## POEMARO:

### LA LUZIDOJ DE CAMOENS

Kanto I, 14, Camoens elvokas portugaliajn heroojn  
Paŝeko, du nomitaj Almeida, Albuquerque kaj Kastro  
Mi ne forgesos verse kanti plurajn,  
per kiuj en reĝlandoj de l' Aŭro  
vi gajnis venkojn daŭrajn kaj sekurajn,  
de via flug' gvidintojn al la gloro;  
Paŝekon ŝtalan, ankaŭ la terurajn  
Almejdajn kiujn celas Taĵo-ploro;  
timigan Albuken, Kastron fortan,  
alian aron, same ja senmorton.  
Leopoldo Knoedt, Brazilo, elportugaligis

### LA FERSTUDENTO

Centra placo de Loveno. Posttagmezo.  
Ĉirpas, krias, amindumas juna gento.  
En danceta poz', en dura pensopezo  
tristas sole senanima ferstudento.

Okultruojn sunradioj penetretas,  
ŝtelirante al la paco inter turojn.  
Kvazaŭ fera ombro pene tretas  
Sur pavimo junulinajn belkonturojn.  
Kaj kripligas fervizaĝon la rikano,  
kvazaŭ kaptas krudan feron ekdolor' de  
karesgeste etendita dekstra mano,  
kvazaŭ revoj ekimpetas for malorde  
al logaĵoj de vangetoj plej kisindaj,  
al rondaĵoj de pugeto pinĉproksima...  
Vesperigās. La okuloj ploras blindaj.  
Kiu diris, ke li estas senanima?

Bruna Ŝtono en Loveno, 24.11.2004

Miša Bronŝtejn, Tihvin, S.Petroburgo, Rusujo

### NASKIĜAS AŬTUNO

Somero konsumiĝas en la flamo  
de l' tegoj, kiel en arda kandelo  
fandiĝas la vakso ĝis la malhelo,  
intere ombroj de intensa dramo.

Pluvo kaj vento estas la reklamo  
de kiel falas la flora mantelo,  
al la aŭtuna sezona rivelo  
kadre de l' ĉiam monotona samo.  
Sur lito de brunfolioj, somera  
sezono mortas; samtempe, aŭtuno  
naskiĝas en la lulilo, himera  
grundo, sub arĝenta pallumo-luno,  
serĉante la fajron de la libera  
krepuskradio de l' aŭtuna suno.

Alberto Garcia Orive, soneto, 2009, Bilbao, Hispanujo

### AL NANJO

Dum venton kaj nubojn obeas l' ĉiel',  
Kaj furiozegas la nokt' februara  
Kreito de di', enkarriĝo de bel' -  
Niksin' min brakumas, kaj flustras:"Ho,kara..."  
Reeĥe al kisoj, al dolĉa kares'  
Min superplenigas tenero anhela;  
Kaj treme mi ardas ĝis sven', ĝis frenez',  
Kisante l' niksinon kun flustro:"Ho, bela..."  
Kaj en ĉi frenezo perdante min mem,  
Dum l' kor' kaj l' anim' ŝtormas,  
brulas kaj flamas,  
L' niksinon mi kisas kun kaŝa ploreml'  
Kaj timas trafustri: "Mi amas vin, amas..."  
Pavel Moĵajev, 18.02.2003, Jalto, Krimeo, Ukrainujo

### PLEZURO

La plezuro  
redonadi plezuron  
pro ricevado de plezuro.  
Neniu donas la unua  
neniu ricevas la unua.  
Ĉio estas spontanea, instinkta,  
intuicia, samtempa, refleksa,  
donado, ĉiam donado.  
Donado sen atendo de redonado,  
sed redonado nepras  
por ke la donado de plezuro  
estu redonata  
pro ricevado de plezuro.  
Nur plezuro vialvide plezuro!

Eduardo Novembro, reta revuo "Karavelo", Portugalujo

### KONSIDERAĴOJ

Mi aŭdas la pepadojn de l' birdoj,  
Kaj multaj neniam aŭdos patrinan voĉon.  
Mi vidas la lumon de l' lampiroj,  
Kaj multaj neniam vidos la sunan lumon.  
Mi kantas per malagrabla voĉo,  
Kaj multaj neniam prononcos vorton.  
Mi piediras, kuras kaj supreniras montegojn,  
Kaj multaj neniam forlasos siajn litojn,  
Seĝojn aŭ lambastonojn.  
Mi ne realigis multajn el miaj revoj,  
Kaj multaj neniam revis.  
Mi plendas, krias kaj indignas,  
Kaj multaj estas nur espektantoj.  
Mi serĉas kaj postulas miajn rajtojn,  
Kaj aliaj nur petegas al Dio lian pardonon.  
Raymundo Souza, Brazilo

8

### LOVENO, LA 6AN DE FEBRUARO

Lovena Semajno de Internacia Amikeco.  
La dujara festo por la Semajno de  
Internacia Amikeco en Leuven okazos  
denove en sabato la 6-a de februaro  
2010. Jes, iom pli frue ol la S.I.A. mem.  
Ne nur tio estos novaĵo! La ejoj estos  
agrablaj etosplenaj skoltaj lokaloj tuj apud  
Leuven, en Winksele (Snoy et  
d'Oppuerslaan). La fama abunda (antaŭe  
vespera) bufedo iĝos tagmeza bufedo,  
vespere ni proponos intertempe same  
faman (antaŭe tagmezan) panmanĝon. La  
serĉpromeno havos novan formon. La  
programo koncentriĝos en la tago. Dum la  
vesperon ni rezervos por neformala  
babilado. Oni venu kaj spertu mem. La  
praktiko ja pli valoras ol mil vortoj. Ne  
necesas antaŭe averti pri alveno, nur veni  
gravas kaj ĉiu estas bonvena. Senpaga  
revunumeron kun persona invitilo estos  
sendita en januaro al ĉiu kiu petas ĝin ĉe  
info@esperanto3000.be ! Ni kalkulas je vi  
por anonci tiun informon jam nun en viaj  
revuoj, retejoj, retgrupoj, klubkunvenoj,  
aranĝoj, familio, geamikaro, kaj nepre  
mem ankaŭe notu ĝin en via agendo ;-)  
Dankon!

Marc Vanden Bempt, Esperanto 3000 Leuven

### venu al Visaginas 26.6-4.7

Pri Baltaj Esperantaj Tagoj, BET-46 en  
2010. Bonvolu plusendu tiun ĉi informon  
al la plej diversaj naciaj, internaciaj kaj  
fakaj dissendolistoj kaj al apartaj personoj.  
Litova Esperanto-Asocio invitas Vin  
partopreni vicajn ĉiujarajn somerajn  
tradiciajn la 46-ajn Baltiajn Esperanto-  
Tagojn ( BET-46 ). BET-46 okazos en  
litovia urbo Visaginas 26-an de Junio - 4-  
an de Julio, 2010. Ĝi funkcios surbaze de  
bonege kaj moderne ekipita Profesia  
studcentro pri teknologioj kaj  
entreprenado de Visaginas ( str. Festivalio  
7 ). En ejoj de tiu Studcentro okazos ĉiuj  
aranĝoj de BET-46. Loĝado en studentaj

kunloĝejoj de tiu Studcentro kaj en  
urbaj hoteloj laŭdezure. Estos aranĝita  
organizita komuna manĝado (manĝoj  
matena, taga vespera) en studenta  
manĝejo. BET-46 ĝuos ĉiuspecan helpon  
kaj kunlaboron de la urba gvidantaro. Pli  
detalaj kaj pli ampleksaj informoj ( kotizoj,  
prezoj, kondiĉoj k.s.) baldaŭ venos en la  
preparata Informilo Nr.1 pri BET-46 kaj  
Aliĝilo. Programo de BET-46 estas  
tradicia tre simila al tiu de la Universala  
Kongreso de Esperanto. Ni invitas ĉiujn  
esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi  
esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ Balta  
maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj  
pli foraj landoj. La kvanto de  
partoprenantoj ne estas limigita.  
Bonvenon!

Povilas Jegorovas,  
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

### AALEN, ŜVABIO, 29-30.01



Invito al esperanta aranĝo, vendrede ĝis  
dimanĉe, 29-31 Januaro 2010, en Aalen,  
Schwaben, sudokcidenta Bavario. En la  
programo estas naĝado en termobanejo,  
ludoj, junulaj agadoj kaj kulturaj vizitoj al  
muzeoj, preĝejoj, artaĵoj, inter aliaj, spekte  
de la famaj kaj specife unikaj pentraĵoj de  
pastro Sieger Köder.

Inge Simon, Brünner Str. 20, D-73431 Aalen  
Inge.Simon@esperanto.de ; +49/7361/360615

## ELEFANTO APERIS EN MIA URBO

Kiel ĉiu sabato mi estis en la urbocentro ĝardena de mia urbo Aalen ĉe la foiro kun mia amiko Jürgen. Tie ni havis grandan, mirindan aventuron. Antaŭ la "Alten Rathaus mit dem Spionturm" (antikva eksa urbodomo kun la turo kun la kapo de la spiono) ni renkontis kun konatolino kaj kun ŝi ni babilis longe. Sed subite ni aŭdis bruon kaj mi rimarkis ke tuj apud mi staris elefanton (mi ne estas ebria ;-)!). Apud mi vere estis grandega vivanta elefanto. Post la unua mirego, tiu ege plaĉis mi. Tiu granda besto en tiom da proksimeco, en la proksimdistanco por tuŝi (tiu estas io vere speciala!). Kiam mi spektas tiuj bestoj en la cirko aŭ en la zoo ili estas tro for, ĉiam ekzistas barilon protektan inter la homoj kaj la bestoj. Sed tiokaze la elefanto estis tiom proksime, ke li povis ankaŭ tuŝi la homojn per sia rostro. La vendistoj je la vendstandoj venis kun kestoj de legomoj kaj fruktoj por manĝigi lin.



La elefanto post tiom komencis trankvile manĝi tiujn aĵojn. Kelkfoje pomoj falis el la kesto dum tiu manĝado kaj kelkaj personoj levigis tiujn pomojn de la tero kaj ofertis ilin al la elefanto. La elefanto tre ĝentile kaj atendeme prenis la pomojn el la manoj de tiuj personoj. Dum tiu agado la elefanto per sia rostro proksimiĝis al infanĉaro kun knabeto, kaj la knabeto ne sciis kiu okazus tiam, sed li ne ploris. Mi

iomete ĉagreniĝis, ĉar mia fotokamerao kaj ankaŭ mia poŝtelefono (kiu ankaŭ havas fotokameraon) estis hejme. La elefanto reklamigis kaj propagandigis la cirkon "Afrika Big Circus", al kiu li apartenas kaj kiu estas en Aalen en la momento. Kelkaj personoj kiam ili rimarkis la elefanton, laŭte kriis "tiu estas elefanto, vere elefanto en la foirplaco" (kiel en germana kanto "Das steht ein Pferd auf dem Flur, ein echtes Pferd auf dem Flur...") (Tie staras ĉevalo en la koridoro, vere ĉevalo en la koridoro). Tio estis ege agrabla kaj mirinda travivaĵo. Sed multaj aliaj homoj nur haste preterpasis la elefanton kaj ja eĉ diris sin kolerigataj ĉar la elefanto blokis la vojon. Pro tio ke mi ne havis fotoaparaton kun mi, mi serĉis kaj demandis en la proksimeco apudmontratan fotiĵon de la elefanto por esprime provi farigi al vi iom da impreson tiel agrablega kiel mi havis.

Inge Simon, Aalen,  
Schwaben, sudokcidenta Bavario, 18-11-2009

## ESPERANTIGITA HOTELO

[www.hotelvanwalsum.nl](http://www.hotelvanwalsum.nl). Hotelo Van Walsum en Roterdamo havas unikan lokon en la historio de Esperanto: ĝi gastigis praktike ĉiujn prezidantojn kaj estraranojn de UEA de la lastaj 50 jaroj kaj multajn aliajn movadajn eminentulojn. Ankaŭ por aliaj esperantistoj tiu hejmeĉa familia hotelo estis natura elekto dum vizitoj al la movada ĉefurbo dank' al ĝia tradicia reklamo en la Jarlibro kaj proksimeco al la CO. La hotelo situas ĉe la bela parkstrato Mathenesser-laan je nur 3-minuta piediro de la sidejo de UEA. Sojle de la novembra Malferma Tago, Hotelo Van Walsum aldonis al la lingvaro de sia retejo ankaŭ Esperanton. Kelkaj menueroj ankoraŭ ne estas tradukitaj, sed la ĉefa enhavo jam estas legebla en Esperanto. En la retejo, la Esperantan sekcion oni povas aliri klakante sur la Esperanto-flago.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 348

## MESAĜO DE UEA PREZIDANTO



Probal Dasgupta kun la redaktoro en Malborko, 3/8/09

Mesaĝo por la deka de Decembro. Estas nia devo hodiaŭ almenaŭ momenton pensi pri la homaj rajtoj. Ni estas movado por la homaj rajtoj, kiu naskiĝis longan tempon antaŭ ol la ĝenerala publika diskutado akceptis ilin kiel seriozan temon. Mi volas kunlegi kun vi tiuteman tekston el la ĝeneva kongresa parolado de Zamenhof kaj peti vin ĉiujn "en viaj kunvenejoj, en viaj hejmoj, en viaj revuoj, en viaj retlistoj" demandi vin, kio ŝanĝiĝis en la etoso, kaj kiamaniere ŝanĝiĝas proe niaj respondecoj en la landaj movadoj kaj sur la internacia skalo. En 1906, do, Zamenhof diris al la aŭdantaro de la dua UK en Ĝenevo: -Ĉe la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ian paroladon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. Tiam parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe nun, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus

granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo. Pri tio ĉi mi tamen ne parolos al vi; ĉar se kiel privata homo ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multemiliona lando, tamen kiel esperantistojn tiu ĉi batalado ne povas vin tuŝi, kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun farata io, kio nin kiel esperantistojn ne povas ne tuŝi: ni vidas en tiu lando kruelan batalon inter la gentoj. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando - tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado intergenta. Terura estas la stato de aferoj en la multlingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! -Mi ne volas interstari inter la pensoj de Zamenhof pri la homaj rajtoj kaj viaj pensoj pri tio, kio fareblas "kaj fendas" en nia tempo. Sed mi avertu, ke la kursivigoj kaj literdikigoj estas miaj, kaj celas atentigi vin pri la transiro de "vi esperantisto" al "ni esperantisto" en la retoriko de Zamenhof. Ĝis la reparolo, mi amike salutas vin. Probal Dasgupta

## ESPERANTO-KONGRESOJ EN JAPANIO EN 2009

Ĉiujare en Japanio okazas 8 Esperanto-kongresoj: tutlanda kongreso organizata de Loka Kongresa Komitato, kaj 7 regionaj kongresoj organizataj de 7 regionaj Esperanto-ligoj.

Pri la tutlanda, nome la 96a Japana Kongreso (okt. 10-12, en Koohu, 381 aliĝintoj) raportis la prezidanto de JEI, Sibayama Zyun'iti, en la 14a de oktobro. Mi raportos pri la regionaj kongresoj tre koncize.

1- La 83a Kongreso de Esperantistoj en Kjusxu (maj. 9-10, en Miyazaki, 46 aliĝintoj) donacis kompacto-diskon "Vojaĝo en Esperanto-lando" en japana traduko. Prelegis: Igor Wasilewski (polo) "Pola kulturo kaj pola spirito", antaŭ lernige por la Bjalistoka UK; Isikawa Tikako "Desegnaĵo de Ei-Q (Sugita Hideo, pioniro de la loka Esperanto-movado kaj moderna arto); Andrew Adams (aŭstraliano) "Kiel lerni Esperanton?"

2- La 58a Kantoo-Esperanto-Kongreso (jun. 6-7, en Tokio, 107 aliĝintoj) havis jarkunsidon de E-Ligo en Kantoo. Okazis fakkunsidoj: "Kanto", "Komputilo", "Saniga metodo laŭ Hietori-terapio", "Tajĝiĉuano", "Fingra kalendaro". Halpern Jack (judo) prelegis "Ĝojo kaj sekreto lerni fremdajn lingvojn". Ekskurso estis promenado al historiaj lokoj kun rivero kaj monteto.

3- La 57a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo (jun. 6-7, en Takatuki, 211 aliĝintoj) havis malfeliĉon: 4 invititaj ĉinoj ne povis veni al la kongreso malhelpate de la gripo. Prelegis: Tani Hiroyuki "Respondo de Zamenhof - nacioj kaj respondecoj pri militoj"; Takahasi Yuuki "Mia Esperanto-vivo en Eŭropo dum studado en Londono"; Utuki Syuho "Malnovaj rakontoj en Oosaka". Programon riĉigis 11 fakkunsidoj, 4 fakprelegoj, 6 esperantaj artaĵoj, deklama kaj oratora konkursoj.

4- La 58a Esperanta Kongreso de Tookai (sep. 12, en Nagoya, 20 aliĝintoj) aŭdis raportojn de UK-anoj, de Esperanto instruisto Isobe Akira en publika mezlernejo, de Himalaja-Renkontiĝano, de registrinto pri sia nomo per Esperanto en pasporto. Ne mankis amuza skeĉo "Rakonto pri la spegulo" kaj serioza

diskuto kiel ofte renkontiĝi kun la membroj de Tookai-E-Ligo.

5- La 73a Hokkajda Kongreso de Esperanto (okt. 3-4, en Sapporo, 35 aliĝintoj) diskutis pri la jarraporto de Hokkajda E-Ligo. Hori Jasuo prezentis bildteatre pri "Hietori-terapio", prelegis pri sia "Mondo grandiĝinta dank' al Esperanto", ludis diversajn muzikilojn el la vojaĝitaj landoj kaj plezurigis ankaŭ neesperantistan publikon.

6- La 50a Toohoku-Kongreso de Esperanto (nov. 7-8, en Yonezawa, 107 aliĝintoj) havis publikan prelegon "Japanio kaj Rusio" de Sergey Anikeev (ruso) kun interpreto. Fakkunsidis: "Konversacio", "Movado", "UK", "Blinduloj kaj Esperanto". Memoriga prelego temis pri "50 jaroj da Esperanto-movado en Toohoku" far de Matumoto Takasi. Estis deklama konkurso, jarkunsido de Toohoku-E-Ligo. Postkongresa ekskurso vizitis budhisman kaj ŝintoisman templojn kaj muzeon.

7- La 10a Esperanto-Kongreso en Ĉuugoku kaj Ŝikoku (nov. 21-22, en Kooti, 49 aliĝintoj) ekskursis al botanika ĝardeno kaj statuo de Sakamoto Ryooma, progresema politikisto en la fino de Edo-epoko. En bankedo oni kantis kaj aŭkciis. La estrarkunsidon de E-Ligo de Ĉuugoku kaj Ŝikoku sekvis raportoj de lokaj rondoj. Publike prelegis Miyoshi Etsuo "Senbarigo de paŝoj kaj lingvoj"; Okamoto Micuo "Cele al la mondpaco sen nukleaj armiloj"; Syam Sundar Pal (baratano) "Esperanto en multlingva Barato" kun interpreto. Fakkunsidis: "Demandu al Pal" kaj "Publika kurso de Esperanto" far de Osioka Moritaka.

Partopreni en aliregionaj kongresoj ne nur interesas individuojn, sed helpas al Esperanto-movado kun amikeco kaj solidareco.

Tahira Masako, Japana Komitatano de UEA  
<http://www.jei.or.jp/hp/esp.htm>  
 Internacia Fako de Japana Esperanto-Instituto.

## REKTE, KURAĜE, ELEGANTE! *Lidia, filino de Esperanto*

Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografaj verkoj, mi konvinkiĝis ke, **a)** ĉiu ajn biografia verko povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni; **b)** ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informofontojn pri la persono.

**Do**, kiam min atingis freŝeldonita de FEL libro "Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto", tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, tra leginte la libron kun apliko de mia a-konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplena verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur nia movado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, kia estis la unua duono de la XX-a jarcento.

**La vivo** de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona - sendube meritis detalan intervenon de sperta biografisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford. Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj biografaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto - kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke (ho ve, - nur post pli ol dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la

biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esperantlingvan leganton.

**De jaro al jaro** vivobildo de Lidia Zamenhof estas fideinde disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de mem la protagonistino kaj ne malpli abunde - diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturoj kaj dokumentkopioj. Antaŭparoloj - por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigis la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la parenkaro kaj per referencoj al kelkaj biografaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon. "Ĉar ne eblas kompreni (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝas per la lia." - kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigis tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: "La doktoro kaj la revo", "Esperanto" kaj "La Interna Ideo". Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri la Esperanto-movado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj - jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indifera por la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian volon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

**"Rekte, kuraĝe, elegante!"** Jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel Ĉemetoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia

dudek unua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn miloj da gelernantoj en Esperantujojn. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombrigitan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj - ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!

**Jen kaj jen** intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas nehoma malamo al unu gento, al judoj - ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: dum mavaj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidas deporti ĉiujn polajn judojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

**Tamen**, mi pensas, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉe-kursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigata reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereco prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulintaj ŝian foriron - ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia - pro antaŭdataj komplikaĵoj ĉe

preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia - lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendinte reveni al Pollando, sed, loĝinta en Persujo, eble li ne havis ĝustan informon pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn... "Se mi forlasis Amerikon, - skribis ŝi al franca korespondanto, - eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco - sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari".

**Ĝis nun** mi neniel menciis la konatan fakton, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe ĉeestas en la libro de Wendy Heller. La Gardanto, Shoghi Efendi, kiun ŝi konsultas konstante. Ŝiaj multnombraj geamikoj-samreligioj, ame kaj helpe akceptantaj ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiajn leterojn - pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

**La traduko** legeblas senpene, ĝinde, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj aŭ ĉe vortoj, nePIVE uzitaj. Mi kursivigu kelkajn ekzemplojn: "Multaj venis el eksterlando por viziti d-ron Zamenhof, preskaŭ kiel pilgrimadon". (p.59) "Sur la scenejo staris la eta Lidia, ŝia aparato, respektive tradukanto kaj du aliaj esperantistoj." (p.199) "Lidia iris hejmen al Varsovio dum kelkaj semajnoj..." (p.232).

Sed se mi pritaksu la tuton, certe, laboro de Bernhard Westerhoff meritas sinceran dankon. Miŝa Bronŝtejn, Tiŝvin, S.Petroburgo, Rusujo

Vidu ankaŭ artikolo de Hélène Falk-Bracke, Aktuala n°2-5/2009

## **BERTHA VON SUTTNER**

Bertha von Suttner [BERta fon SUTne] naskiĝis en Prago kiel Bertha Sophia Felicita Gräfin von Kinsky von Chinic und Tettau la 9-an de junio 1843. Ŝi mortis la 21-an de junio 1914. Ŝi estis aŭstra pacistino kaj verkistino. Kiel juna virino ŝi laboris kiel edukistino en la familio von Suttner kaj enamiĝis al ties plej juna filo Arthur von Suttner. Sen la scio de la familianoj la paro geedziĝis en Vieno en la jaro 1875. La geedzoj dum naŭ jaroj (1876–1885) vivis en la Kaŭkazo kaj komencis vivteni sin per verkado. Reveninte al Vieno Bertha von Suttner ekinteresiĝis pri pacifismaj temoj. En la jaro 1886 ŝi en Parizo reenkonsilis la inventiston Alfred Nobel, kiun ŝi dek jarojn antaŭe ekkonis kaj kiu subtenis ŝiajn pacifismajn idealojn. En 1887 ekestis ŝia kontraŭmilita romano "Die Waffen nieder!" kiu fariĝis la plej granda sukceso en ŝia literatura kariero. La verko "Die Waffen nieder!" aperis ankaŭ en Esperanto sub titolo "For la batalilojn!".

Komence pluraj eldonistoj rifuzis la eldonadon kaj nur en la jaro 1889 ĝi publikigis en tre malgranda eldonkvanto – kaj vendiĝis tiel bone, ke baldaŭ sekvis pliaj eldonoj kaj tradukoj al pluraj lingvoj. En 1891 Bertha von Suttner instigis la fondon de la *Österreichische Friedensgesellschaft* (Aŭstra Societo de Pacamantoj), kies prezidantino ŝi fariĝis, kaj unu jaron poste ŝi fondis similan societon en Germanio. En 1905 ŝi gajnis la Premion Nobel de Paco. La 21-an de junio 1914 – mallonge antaŭ la komenco de la 1-a Mondmilito – ŝi mortis en Vieno. Laŭ ŝia diro: "La pacifismo kaj Esperanto estas kuzoj". Aŭstra 2-eŭra monero havas portreton de Bertha von Suttner, tiel kiel antaŭa bileto de 1000 Schilling.

Vikipedio (vidu ankaŭ Aktuala, Junio 2009, kie estas artikolo de Hélène Falk-Bracke)



Baronino Bertha von Suttner



Alfred Nobel kaj lia oficejo en Bofors, Svedio

## **AMHISTORIO DE ALFRED NOBEL** **Nepreparita artfajraĵo**

Kiam en 1851 li revenis al Rusio, Alfred Nobel konatiĝis kun nitroglicerino danke al iu profesoro en Sankt-Peterburgo, kiu kaŭzis malgrandajn eksperimentajn eksplodojn frapante per martelo sur fluidaĵo, inventita de la itala kemiisto, Ascanio Sobrero. Tiu ĉi preparis olecan fluidaĵon, verŝante glicerinon sur miksaĵon el sulfuracido kaj nitratacido. Tiun produkton li nomis 'piroglicerino' (de la greka 'pyr'= fajro). Sed la italo ne sukcesis bridi sian nestabilan kaj danĝeran eksplodaĵon, kaj tial lia inventaĵo trovis nenian praktikan aplikon.

Alfred tuj antaŭsentis la industriajn eblecojn de tiu produkto. Li aĉetis la rajtojn de la itala Sobrero, kiu en la estonteco estis direktonta unu el liaj ĉefaj

fabrikoj. Multajn jarojn li laboris super la perfektigo de la eksplodaĵo, kombinante nigran polvon kaj nitroglicerino. Finfine li sukcesis perfektigi ĝin en 1864. Tiu unua sukceso igis lin kredi, ke li fine mastris triun kapriceman eksplodaĵon. En 1861 li fondis fabrikon en Svedio kaj alian en 1865 en Germanio. En 1866 li foriris al Nov-Jorko, kie li prenis breveton je sia eksplodaĵo kaj subskribis kontrakton kun pluraj industriaj societoj por la fabrikado de nitroglicerino.

Sed la tempo de la granda sukceso ankoraŭ ne venis. En 1866 eksplodo detruis la deponejon de nitroglicerino en San Francisko (Usono), mortigante kvinon da personoj. Ses monatojn poste ŝipo, transportanta botelojn de nitroglicerino, dissaltis apud Panamo. Ĉe tio kvindek homoj perdis la vivon kaj multaj estis vunditaj. Post tio sekvis la fabriko de Nobel por eksplodaĵoj en Kummel apud Hamburgo, Germanio. Estis la ĉefa fabriko en Eŭropo. Tiam sekvis liaj detruantaj eksplodoj en Svedio kaj Aŭstralio. La sekvoj estis gravaj kaj igis sin senti mondnivele. Multaj naciaj registaroj malpermesis la uzon kaj transporton de la danĝera substanco. La produktado de nitroglicerino ŝajnis estis kondamnita.

### *Dinamito konkeras la mondon*

Nobel ne malesperis. Li nelacigeble eksperimentis per novaj kombinaĵoj de stabiligantaj materialoj, sed la plej multaj senfortigis aŭ mis-formis la eksplodon en forbruligon sen uzebla forto. Kiel por multaj aliaj grandaj inventaĵoj, simpla hazardo liveris la solvon de tiu problemo. Kiam iutage li forlasis sian fabrikon en Kummel, Nobel rimarkis, ke iom da nitroglicerino estis falinta sur la alvojo. La sabla tero estis miksiĝinta kun la fluidaĵo, sed anstataŭ formi ian kaĉon, ĝi estis transformita en firman kaj samtempe

orkoloran amason. La miksaĵo kunmetis sin mem en ideala proporcio.

Kelkajn tagojn poste Nobel disponis pri firma kaj forta eksplodaĵo, apenaŭ malpli forta ol pura nitroglicerino, kun perfekta stabileco kaj transportebla kun multe malpli da danĝero. La uzata pora kaj argila materialo portis la nomon "Kieselguhr" kaj abundis en Norda Germanio. Alfred Nobel brevetigis sian novan inventaĵon sub la nomo 'dinamito' laŭ la greka vorto por 'forto', 'dynamis'.

En 1867 la fabrikoj de Nobel produktis entute dek unu tunojn da dinamito. Sep jarojn poste ili liveris tri mil tunojn en unu jaro. Intertempe Nobel fondis dek unu fabrikojn en same tiom da eŭropaj landoj. En Usono li fondis la 'Giant Powder Company' (Giganta Pulvo-Kompanio) por la fabrikado kaj vendado de dinamito. Ĉiuj karbo- kaj ŝtonminejoj tra la tuta mondo deziris aĉeti la novan eksplodaĵon. Dinamito fariĝis la plej bona industria afero en tiu tempo, kaj Nobel fariĝis la plej konata industriisto en la mondo.

En Francio li renkontis la plej grandajn malfacilaĵojn por siaj industriaj entreprenoj pro la ŝtata monopolio koncerne la fabrikadon de eksplodaĵoj. La milito de 1870 kontraŭ Germanio kun la spektaklo de la teruraj detruoj per dinamito fare de la germanaj trupoj estis necesaj por decidigi la francan registaron rifuĝi al la sveda industriisto.

### *La perfekta sekretariino*

Intensa laboro kaj vojaĝado ne lasis al li multan tempon por privata vivo. Je la aĝo de 43 jaroj li jam sentis sin maljuna viro. Por siaj aferoj Nobel konstante vojaĝis de unu ĉefurbo al alia, kaj samtempe de unu terma institucio al alia por flegi sian sanon. Tiel li fariĝis la plej riĉa vaganto en la mondo! Li ankaŭ fariĝis la plej cinika viro de sia tempo. En 1875 li diris al unu el siaj societanoj. "En mia ĉirkaŭaĵo mi vidas

15

16

nur homojn kiuj volas profiti de miaj vizitoj. Nur inter hundoj homo povas fari al si amikojn!"

Malgraŭ tiaj amaraj diraĵoj li serĉis distriĝon por ĉiuj siaj zorgoj, sed apud multe pli ĝojigaj kreitaĵoj. Mallonge post kiam Bertha von Suttner forlasis lin, li renkontis en Baden apud Vieno, kie li faris akvokuracon, la junan floristonon Sofia Hess. Ŝi havis dudek jarojn, estis blonda kaj bone formita. Ŝi ŝajnis havi ĉiujn kvalitojn por esti perfekta 'sekretariino'.

Kun tiu titolo Nobel kunprenis ŝin al Parizo, kie li lukse instalis ŝin. Ŝajnas, ke la maljuna magnato firmege korigiĝis al la bela knabino, kaj ke li eble eĉ havis la intencon edziĝi al ŝi. Sed kiam li provis fari el ŝi distingitan instruitan virinon, dignan por iri kun li eksteren en la grandan mondon, li malkovris, ke ŝi estas eksterordinare vulgara. Nobel, kiu estis kutimiĝinta al intelektula kaj delikata virino, kiel baronino Bertha von Suttner, tre baldaŭ ne povis toleri ŝin. Li resendis ŝin al Vieno kaj donis al ŝi gravan pension, ne merititan per ŝiaj 'virtoj'.

### *Dinamito en la sango*

Alfred Nobel aktive okupiĝis pri la virina sekso, sed tamen trovis tempon, por daŭrigi siajn esplorojn pri eksplodaĵoj. Tiamaniere li kombinis, en 1887, nitroglicerino kun fulmikotumo kaj kolodiuo, kaj obtenis gelatinon, kiu estas same stabila, kiel dinamito. La vendo de tiuj eksplodema 'ĝelo' tuj atingis altajn ciferojn kaj aldonis pliajn grandegajn enspezojn al la jam fantazie riĉa Nobel.

Dum la jaroj 1894-1895 la sanstato de Alfred Nobel rapide plimalboniĝis. Li regule havis korpremiĝojn, kaj liaj vejnoj estis danĝere kalkiĝintaj. Tie ĉi situas la fama epizodo de la kuraco per nitroglicerino, kiun iuj historiistoj stampis kiel "tro belan por esti vera". Kiel ajn, la medicinisto de Nobel vere povis preskribi

nenion pli bonan al viro, kiu laŭlitere havis dinamiton en la sango.

En tiu periodo Nobel rezignis pri la aktiva prezidenteco de siaj multaj konsilioj de administrantoj kaj komencis redakti sian testamenton. Verfakte li redaktis plurajn, ĉiam adaptante unu aŭ alian klaŭzon laŭ la evoluo de siaj ideoj. Ĉiuj scias, ke la definitiva teksto enhavis la kvin konatajn Nobel-premiojn, aljuĝatajn ankoraŭ en nia tempo: kemio, fiziko, fiziologio kaj medicino, literaturo, paco. Sed kion ne ĉiuj scias, estas, ke tiu lasta premio, la plej spektakla inter ĉiuj, probable ne ekzistus, se Nobel ne estus koninta la belan Bertha von Chinic.

Baronino Bertha von Suttner ankaŭ verkis tre konatan pacifisman romanon, kiu estis tradukita en multajn lingvojn. En Esperanton ĝi estis tradukita far Prof. Armand Caumont kaj aperis en marto 1914 sub la titolo: "For la batalilojn!" D-ro Heinrich Arnhold, kiu verkis la antaŭparolon de la romano, skribis ke baronino Bertha von Suttner konsilis lin lerni Esperanton, kion li faris. Al la Dresdena Esperanto-Societo, kies membro li estis, ŝi iam sendis telegramon kun la teksto: "Esperanto kaj Pacifismo estas kuzoj".

Verkis René Tholy. Tradukis redaktoro de "La Ponto" dumonata periodaĵo de la Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.) **Pieter Jan Doumen**, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47; [pieter.doumen@adsl4you.be](mailto:pieter.doumen@adsl4you.be)

### *KULTURA CENTRO DE DILBEEK*

Kunvenas ĉiun lastan sabaton de la monato esperanta konversacio-rondo, de la 14a ĝis la 16a horo (Kamerijklaan 1700). Ĉiuj estas bonvenaj. Buso DE LIJN nun komence de Dansaert strato 127-128.

Emile Van Damme, 02 567 17 83  
Marc Demonty, 02 569 31 33



## BELARTAJ KONKURSOJ

Belartaj konkursoj de UEA en 2010. La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 61-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 95-a Universala Kongreso en Havano. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj: Poezio: maksimuma longo ne fiksita. Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj). Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita. Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo "Interproksimigo de kulturoj", proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja". Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2009. Unu premio. Filmo kaj Kanto: ĉi-foje, eksperimente, la aŭtoroj mem elserĉos premiindajn verkojn. Ĉiujn konkursaĵojn, en unu ekzemplero, escepte de tiuj por la branĉo. Infanlibro, oni devas sendi al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio, aŭ prefere rete al la adreso: [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it), indikante pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Premioj: unua premio 240 eŭroj, dua premio 168 eŭroj, tria premio 96 eŭroj; Nova Talento 168 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 504 eŭroj. Detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj ĉe ĝia retejo

[http://uea.org/dokumentoj/belartaj\\_konkursoj\\_reguloro.html](http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_reguloro.html).  
Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 344

## BALOTADO ĈE UEA

En 2010 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2010-2013. Parto de tio estos elekto de komitatoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM je la 31-a de decembro 2009 oni elektos ses komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) priskribas: "Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn."

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo ĝis la 28-a de februaro 2010. Validaj estos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj aŭ retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 2008 kaj 2009) kaj resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon en la periodo 2004-2009, ne estas reelektebla. Se ne estos pli ol ses validaj kandidatoj, oni konsideros ĉiujn elektitaj. Se ili estos pli multaj, la individuaj membroj ricevos voĉdonilon por elekti siajn reprezentantojn per poŝta balotado.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA

## RUSIA JUBILEO

Rusia Esperantista Unio invitas partopreni « REK-26 » Rusian Esperantistan Kongreson en urbo Sankta-Petroburgo, 27-31.05.2010. Blankaj noktoj dum urbo-taga festo!

**Antaŭ 100 jaroj** (1910) en Sankta-Petroburgo okazis unua Rusia Esperantista Kongreso, kiun partoprenis la kreinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof. Rusiaj esperantistoj celebros la jubileon per tradicia tutlanda kongreso en la dua rusia ĉefurbo, kaj invitas gastoj el la tuta mondo.

**Venu ĝui** belegan urbon, ĝiajn muzeojn, teatrojn, katedralojn; promeni piede en parkoj kaj ŝipe per kanaloj kaj rivero Neva; venu ekkoni rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusaj esperantistoj!

**La programo** de la Kongreso estos varia kaj plurflanka. En kadroj de la Kongreso okazos vica konferenco de REU, kunveno de REJM, prelegoj pri historio de Esperanto-movado en Rusio, pri interlingvistiko, pri lingvaj festivaloj. La kongresanoj spektos du teatraĵojn en Esperanto kaj kelkajn koncertojn. Estos abunda turisma programo.

Post-kongreso 1-5/6 estos en Moskvo

**Kontaktoj:** Valeria Cvetkova pri turisma programo: [esperanto1892@rambler.ru](mailto:esperanto1892@rambler.ru). Anna Butkeviĉ, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato: [annaespero@mail.ru](mailto:annaespero@mail.ru).

## JULES VERNE ESPERANTISTO

Ek de Verne patro ĝis Verne filo: kien Esperanto malaperis? Abel Montagut esploris la sorton de nefinita romano de Jules Verne, "Voyage d'études" (1903), kaj konkludas, ke la fama verkisto preskaŭ ĝis la fino de sia vivo okupiĝis pri kompleta reverkado de la romano, en kiu Esperanto devis havi gravan rolon. Laŭ la konservita formo, la unua manuskripto de la romano antaŭvidis harmonian, idealan

koloniadon en la franca Kongolando, kie Esperanto ludas faciligan rolon por civilizacio kaj komerco. Novaĵoj pri kruelaĵoj kaj ekspluatado en Kongolando devigis lin ŝanĝi sian planon. En sia tria artikolo pri la temo Abel Montagut montras, ke Jules Verne ne disreviĝis rilate Esperanton, kaj ke en skizita nova versio de la romano por Esperanto daŭre estis antaŭvidata grava rolo. Post morto de Jules Verne lia filo Michel ekokupiĝis pri lia literatura heredaĵo kaj la mencioj pri Esperanto restis en la nepublikigitaj manuskriptoj.

Vidu ankaŭ pri Verne *Aktuala* 10/2009, paĝo 5

## ESPERANTA FLAGO



Nova E-flago prezentita en Foŝan (Ĉinio). La 26an de novembro 2009 estis prezentita en la "Lernejo por Porprofesiaj Studoj" de Foŝan, nova Esperanta flago. Ĉirkaŭ cent gelemantoj de tiu lernejo partoprenas la kurson de Esperanto, organizita de ties direktoro, s-ro Peng Jin, kaj instruita de Augusto Casquero de la Cruz. Sur la foto oni povas vidi gelemantojn de Esperanto.

Augusto Casquero de la Cruz

## BENELUKSA KONGRESO 2010

Antverpeno, 13-16 majo 2010.

Temo "Lingva Prismo en Benelukso". Flandra Esperanto Ligo invitas vin. Bonvolu aliĝi. [www.esperanto.be/kongreso](http://www.esperanto.be/kongreso)



Elstara gvidanto de la kurso de Esperanto de dua nivelo (progresantoj) kun 8 kursanoj en 2009 - 2010